

## & La muso kaj la rano:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 290 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigas Martin Strid (2015).>

### (#Melodio:

<:29> (/La dore mi mi mire fare mi do; do redo dodo doLa dodo doTi;

(#Rekantaĵe: La dore mi mi re falre mi; doTi reTi do Lado Ti Ti La a)

)×10 )+

### (&Strofoj:

'1 /La muso amikiĝis al la rano, ; invitis  
kaj regalis ĝin per pano,

(×; **Venu mastrino en la2 ĉen' ;  
Prenu mian manon en firma ten'.**)

'2 fromaĝ', mielo, figo, nukso, pomo ;  
(ĝi loĝis en kamer' de riĉa homo). .....

'3 Ili festenis gaje kaj feliĉe, ; kaj kiam  
ili manĝis jam sufiĉe, .....

'4 la rano diris: "Venu al mi gastis, ; vi  
ankaŭ tie ne bezonas fasti. ....

'5 Sed por ke vi ne timu, mi per ŝnuro ;  
kunligos nin. Ĉe l'marĉ' al sia kruro .....

'6 ĝi ligis ties kruron, kaj subite ; ĝi  
plonĝis. Nia muso, alligite, .....

'7 tiriĝis kun ĝi al la marĉ', kaj veis, ;  
sufokiĝante tie: "Mi pereis! .....

'8 Vi, sendankulo, kaŭzis mian morton,  
; sed estos, kiu venĝi havos forton!"

.....

'9 Kaj jen, ĝin, dum en akvo ĝi baraktis,  
; ekvidis niz', alflugis kaj ĝin kaptis.

.....

'10 La ran' surŝnure pendis kiel pluso, ;  
la niz' ĝin manĝis kune kun la muso.  
..... )